

*Ni ludas*, Dansk Esperanto Forlag  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 437 1972.02.23 & 26

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La Eldonejo **Dansk Esperanto-Forlag** fakiĝis en la aperigo de broŝuroj, kiuj estas utilaj por vigligi la vivon en la lokaj grupoj.

A.- Ĝi ĵus eldonis libreton sub la titolo *Ni ludas...* Temas pri ludoj per vortoj, ludoj per papero kaj krajono, vet-kurado, kaj aliaj ludoj, kiuj estas proponataj de Gudrun Riisberg kaj F. Lowitzer al la gvidantoj de la esperanto-societoj.

Cl.- El la antaŭparolo de tiu 32-paĝa broŝuro ni legas :

A.- « *Feriaj semajnoj, feriaj kursoj, internaciaj konferencoj kaj semajn-finaj aranĝoj, kiuj ĝenerale laboras serioze kaj streĉe, bezonas kelkfoje distriĝon kaj amuziĝon. Tiaj aranĝoj povas ĉerpi multe el ĉi tiu kolekto. KREDU, ke per ĉi tia distra programo kreiĝas ofte pli agrabla etoso kaj pli da internacia amikeco ol per longa serioza diskutado.* »

Cl.- Kaj nun ni legos al vi kelkajn el la proponitaj ludoj, por ke vi ricevu ideon pri tiu utila broŝuro, kiu alportos multajn ideojn al la klub- kaj kurs-gvidantoj :

A.- Jen la ludo **ni verku romanon** :

Cl.- *Ni verku romanon. Tion diras la gvidanto al la ĉeestantoj, kiuj ricevis numeron. Mi komencos ĝin. Kiam vi aŭdos mian sonorileton (aŭ alian signalon) numero unu daŭrigu la rakonton, post tio numero du kaj tiel plu. Uzu vian fantazion, ĉar la romano devos esti romano de l' fantazio. Jen la komenco : « Antaŭ multaj jaroj mi pasigis kelkajn somerajn semajnojn en vilaĝo apud lago kaj arbaro. La vetero estis eksterordinare bela. Ĉiutage mi iris al la lago por bani min, kaj post tio mi sunbanis sur la sablo de l' strando. Foje, kiam mi kuŝis tie, atakis min hundo, granda hundo, simila al lupo. Ĝi volis min mordi per siaj akraj dentoj. Mi ne sciis kion fari, ekstaris kaj kuris en la akvon de la lago. Ĝi persekutis min... »*

A.- (Tinto). *Numero unu devas daŭrigi... proksimume 2 minutojn ĝis nova tinta, post kio numero tri daŭrigas la romanon, kaj tiel plu.*

Cl.- *Per magnetofono oni havas la eblecon poste aŭdigi la romanon al sia grupo aŭ al alia. Sed oni ne insistu pri tiu aranĝo, ĉar multaj personoj timas mikrofonon.*

A.- En la kategorio *Ludoj per papero kaj krajono* jen la ludo **Kion signifas ĉi tio?**

Cl.- *Slipoj kun vortoj por objektoj, bestoj aŭ homoj kuŝas sur tablo – dorsflanko supren. Laŭvice la partoprenantoj prenas slipon – ne montrante la tekston – kaj demandas alian personon : « Kion similas ĉi tio ? » La alia do devas respondi ankoraŭ ne sciante, pri kio li respondu.*

A.- *Ekzemple la demandita persono respondas « kato », sed montriĝas, ke sur la slipo staras la vorto « kandelo ».*

Cl.- *Nun la devo do estas klarigi, kiel kandelo similas al kato.*

A.- *Oni povas ekzemple diri, ke kandelo lumas, kaj la okuloj de la kato povas lumi.*

Cl.- *Sed ofte la tasko estas malpli facila, kaj la klarigoj sekve pli fantaziaj ; sed tio ĝuste estas la ĉarmo de la ludo.*

A.- Kaj jen la ludo **Ĉu vi scias literumi ?**

Cl.- *Elektu du personojn, eble sinjoron kaj sinjorinon. Ili portu ĉapelon. Petu ilin literumi laŭvice – li la vorton **letero** –ŝi la vorton **telero**.*

A.- *Nun ili denove literumu – alterne – fakte ĉiu kvin fojojn. Unue anstataŭ la litero **e** ili fajfu. Due anstataŭ la litero **t** ili manĉapu dufoje. Trie anstataŭ la litero **l** ili levu la ĉapelon. Kvare anstataŭ la litero **r** ili donu reciproke la manon. Kvine anstataŭ la litero **o** ili diru « **kuk** ». Poste ili faru la kvinan samtempe.*

Cl.- *Se ili ankoraŭ emas, ili same (do laŭ la kvina metodo) literumu : **retroletero** kaj **tretoletero**. Aliaj uzablaj ekzemploj estas **libro-brilo** kaj **krabo-brako**.*

A.- *Uzu vian fantazion, - kaj se vi disponas tintilon, knarilon, malnovan aŭtokorilon aŭ similan, uzu ankaŭ ilin anstataŭ aliajn signojn – laŭplaĉe.*

Cl.- Jen la ludo **Kunlaboro** :

A.- *Du personoj devas komune enpaki ekzemple libron per papero kaj ŝnuro. Ili laboras samtempe, sed A uzas nur la dekstran manon, kaj B nur la maldekstran.*

Cl.- *Pluraj paroj konkuras, kaj komitato juĝas la rezulton : la libro devas esti bele enpakita, ligita per ŝnuro kun nodo.*

A.- *Unueco estas forto ! Oni povas variigi la ludon tiel, ke la paroj devas malfermi pakajon.*

Cl.- Jen la ludo **Tia estas mi**.

A.- *Ĉiuj ĉeestantoj ricevas paperon kaj skribas sur ĝin tri informojn pri si mem – sed verajn, nepre verajn.*

Cl.- *Oni faldas la paperojn, kolektas ilin kaj poste elprenos unu post la alia kaj voĉlegas la tekston.*

A.- *La tasko estas diveni, kiu estas kiu.*

Cl.- *Tiuj ludoj, kaj multaj aliaj, estas proponataj en broŝuro, kiun Dansk Esperanto-Forlag ĵus eldonis sub la titolo *Ni ludas*.*

A.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando.*

Cl.- *Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !*